

HABIS

JUNULARA SEKCIO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO


REDAKTORINO:
SR-INO CARMEN NAVARRO

Nro. 78 - 1972

Str. Barren calle Barrena, 7 - 1.^a
Telefono 24 44 92 - BILBAO-5



NIAJ ESTONTAJ ESPERANTISTOJ






LA AMO

Kie forestas tempo kaj spaco,
Kie la vivo estas sen laco,
Kie muzikaj ondoj vibretas,
Kie ordono kruda nur petas,
Kie adioj ŝvebas sen sonoj,
Kie regadas reĝoj sen kronoj,
Kie viviĝas ĉio sen formo,
Kie animo songas sen dormo,
Kie sen ombro brilas la flamo,
TIE, naskiĝas vere, la AMO.



Kie batalas koro por paco,
Kie malzorgo plendas pro laco,
Kie la kreoj jam nur detruas,
Kie la ĝojoj ĝojon enuas,
Kie la lipoj kurbe silentas,
Kie animo faron pripentas,
Kie eĉ celo estas sencela,
Kie la suno froste malhela,
Kie ne donas varmon la flamo,
TIE, mortadas vere, la AMO.



Kie triumfas venke konsento,
Kie karesas eĉ la silento,
Kie la baloj rompas fervoro,
Kie por koro batas la koro,
Kie espero iĝas vivcelo,
Kie la tero ŝajnas ĉielo,
Kie fondiĝas flamo kun flamo,
TIE, ja vivas vere, la AMO.



! ! ! ! ! ! ! ! ! !

(El poezio de Julio Baghy)

STRIFE



"La bagateloj donas al la vivo koloron, kaj estas kvazaŭ la spicoj de la vivo. La vivo mem estas bagatelaro. Oni ne malestimu la bagatelojn!" JOHAN HAMMOND ROSBACH

Parolante, la juna paro surtrotuare promenis.


Eke ŝi rigardis liajn okulojn kaj, enbrakigante lian kolon, daŭre kisadis lin surlipe.

Kelkaj gepromenantoj ariĝis ĉirkaŭ la gejunuloj kaj klaĉe fimurmuris.

Neatendite maljuna sinjoro senvorte alproksimigis al ili, disigis la geparolaĉantaron, prenis la manojn de li kaj ŝi, kaj - dirante nenion - kisis ilin survange.

Post tio la nekonato tuj foriris.

Tio okazis en iu el la ĉefaj stratoj de Barcelono. Dum aŭgusto.



Atjkus Bukiŝ



XXVIII-a I.J.K. EN POLA TORUN


Unue, mi devas klarigi ke pro ne ebla samtempa disrompiĝo mi ne partoprenis tiun kongreson, ĉar dum tiuj datoj okazis la nacia poresperanta kongreso en Vigo. Krome, mi reprezentas nian H.E.J.S. en la Komitato de T.E.J.O. kaj, ĉar mi ne sciis pri la hispana partopreno, mi nomis, kun aprobo de la estraro, anstataŭanton al fraŭlino el socialisma lando.


Bedaŭrinde, la nescio ke diversaj gehispanoj vojaĝus al tiu kongreso devigis min, kaj ankaŭ la estraron de HEJS, elekti eksterlandan personon por reprezenti nian junularon.

Sendube ke tiun ĉi raporton devus fari ŝi mem, sed estis iaj cirkonstancoj, ne justaj, kiujn mi celos klarigi al vi por la ĝenerala scio de ĉiuj niaj membroj. Pro tio dum la raporto mi mencias faktojn, sed ne nomoj.

Due, laŭ la statutoj de T.E.J.O. estas neŭtrala kaj tion tre klare difinas la artikolon 5. Sed dum tiu ĉi kongreso nia reprezentantino estis superdominata de aliaj samlandanoj, kontraŭante la paragrafon "b" de la artikolo 4 de la Deklaracio de Tyresö kaj kontraŭante ankaŭ la homan liberecon kaj la ne-dudeblan demokration kiuj devas regi niajn plej superajn organojn. Ja, ni ne eblas apogi tiun diktatorecon, ĉar tio signifas klaran nacian partiecon, kiu kontraŭas la nomon de T.E.J.O. ĉar T.E.J.O. estas tutmonda kaj ne nacia organizo, kaj ankaŭ ĉar tio signifas certan deziron superregi nian asocion kaj veran apartigon kaj imperisman agadon per tiuj gesamideanoj, kiuj, anstataŭ labori por la progreso kaj disvastigo de Esperanto, efike agas por sia propra elstareco en la movado.


Fine, mi devas bedaŭri ankaŭ la fakton ke kelkaj gehispanoj ne eblis trapasi la landlimon per Ĉeĥoslovako pro malfacilaĵoj en la polaj doganoj. Eble la kaŭzo estis ke por la eniro bezonis invitilon de la kongresaj organizantoj.





Krome, ne ĉio estis malhelpo en ties kongreso. Kaj mi, nome de nia reprezentantino, dankas pro la helpo kaj kunlaboro donita al ŝi, S-ron Tomas Jansson, nova prizorganto de K.E.R.; Margarita Nájera, gvidantino de la meksika sekcio; S-inon Flóra Szabo Felső, ĝenerala sekretariino de T.E.J.O.; S-ron George Winkler, redaktoro de la Tejo-paĝo en la revuo "Esperanto". Do, restas al mi danki ŝin pro la sindona kaj efika reprezentanteco kiun ŝi faris por la hispana esperantista junularo, malgraŭ la menciita subpremado.

Preskaŭ mi forgesis diri ke la plej interesa kongresprogramero estis la sincera dialogo kiu regis la diskutojn de la seminaria temo: "Junularo kaj la Tria Mondo", kie esprimis diversajn kaj malsimilajn opiniojn tute libere.



HEJS-ano.

= = = = =

MI ESTAS
REVOLU-
CIULO...



... PRI LA
DANCARTO



GONZALO.





el **barcelono**

Pasintan julion vizitis Barcelonon kaj poste aliajn urbojn de Hispanio, D-ro Vilmos BENCZIK - profesoro pri hispana literaturo en Budapesto - kaj lia edzino, kiuj estas konataj geaktivuloj en la internacia kaj hungara esperanto-movado.

La antaŭlastan tagon de ilia restado en la grafa urbo s-ro Benczik prelegis en la societo "Stelo de Paco" pri "Esperanta literaturo kaj instruado". La societa prelegĉambro plenpleniĝis.

La oratoro resumis la esperantan literaturan historion kaj starigis jenan demandon: ĉu esperanto estas literatura lingvo kaj lingvo por tekniko ?.

Pri la unua li alsendis nin en la faktojn kaj arojn da verkoj originalaj, tamen li plendis



D-ro Vilmos Benczik dum la prelego.



Parta vidaĵo de la prelego.

pri tro da poeziaĵoj kontraŭ maltro da roman-nove-
loj. Ĝis nun la originala proza literaturo es-
tas - kun gravaj esceptoj - ankoraŭ nek sufiĉe a
bunda nek altnivela rilate al la aliaj etnaj lite-
raturaj.

Kial ekzistas malmulte da teknikaj verkoj
en esperanto ? Laŭ la parolanto, ĉar la gravaj
verkoj estas jam en nacilingvoj, ne abundas la ti
aliteraturemaj legantoj, kaj mankas bonaj traduk-
istoj kaj tradukservoj.

La preleganto instigis la instruistojn por
ke ili diskonigu esperantan literaturon al la ge-
lernantoj ekde jam la elementa kurso pere de faci-
laj verkoj de Zamenhof, Privat, Baghy, Auld, k.a.

Post la interesplena prelego sekvis debato
pri esperanta literaturo, kiun multaj ĉeestantoj
partoprenis.

Finfine, gesinjoroj Benczik prezentis al
ni siajn du lastajn librojn (+)(++): traduko el
hungara priskribema verkisto, kaj facila legoli-
bro por komencantoj.

Raportis JAN

(+) PATROMURDO EN LA NIGRA MUELEJO, de István
Ráth-Végh. El la hungara tradukis Maria Benc-
zik. Eldonis Hungara Esperanto-Junularo. Bu-
dapest, 1967. 47 p. 14x10 cm.


(++) ŜERCOJ, RAKONTOJ. Kompilis Vilmos Benczik.
Eldonis Tarkönyvkiadó. Budapest, 1972. 104 p.
16x12 cm.

oOo oOo oOo oOo oOo oOo oOo oOo oOo



VOJAĜANTO DE ~ FELIÇO ~

Oni ne necesas prezenti la mondfaman Pastro'n Narciso Irala S.J. grava verkisto kaj precipe oratoro pri psikologio, tre konata preskaŭ ĉiuj landoj kiel "MESAGISTO DE FELIÇO". Li prelegas nun en Bilbao. Pastro Irala disponas je malmulte da tempo ĉar multaj homoj alvenas por ricevi de li konsolajn vortojn, konsilon, iomete da lumo por iliaj streĉaj vivoj. Sed kiam mi prezentas min kiel membro de la Esperanta Grupo li tre ĝojas, fortepremas mian manon kaj post kelke da vortoj esperante parolitaj rendevuas min por la morgaŭa tago.



P. Irala akuratas. Alta, magra, rideta viro sep dekjara kun ĉinaspekta, duonblanka barbo. Liaj movoj estas decidaj kaj trankvilaj. Lia voĉo eliras dolĉe kaj firme. Liaj okuloj mole rigardas, preskaŭ karesante. La esperanta temo memorigas al li tre malproksiman tempon. Li paroladas pri sia infaneco kaj pri siaj unuaj esperantaj espertoj :

- Mi eklernis Esperanton rezulte de prelego kiun mi aŭskultis en lernejo "La Concha". Mi tiam estis infano.
- Mi legis ke vi parolas ĉirkaŭ naŭ lingvojn kaj konsideras Esperanton kiel granda helpo por lerni la aliajn.
- Tiel ĝi estas. Ĝi estas ideala bazo por la aliaj. Kiel montraĵo mi diros al vi ke mi lernis la francan dum monato kaj la anglan dum kelkaj monatoj.
- Ĉu vi prelegis iam esperante ?.

1 2 3 4 5 6

- Jes. Mi kelkefoje prelegis esperante. La unuan fojon en Brazilo. Mi tiam ne konis bone la portugalan lingvon. Ĉeestis tricent geaŭdantoj el diversaj landoj kaj je la fino ĉiuj el ili estis tre kontentaj ĉar ili komprenis min tute bone. La samo okazis en Guatemalo.

- Ĉu vi opinias ke ĝia disvastigo meritas nian klopodon ?

- Sendube. Mi, je mia maniero, ankaŭ faras tion. Provente la mikrofonon antaŭ la prelego, mi parolas esperante kaj iuj, aŭdante tiujn strangajn vortojn de mandas al mi. Mi profitas la okazon por klarigi ĝin al ili. Tiel okazis iam en Buenos Aires, dum prelego al junulara ĉeestintaro, kaj kiam mi alifojje revenis tien, tiuj samaj gejunuloj estis esperantitoj. Agradebla surprizo por mi.

- Kion vi pensas pri la estonteco de esperanto? .

- Ĝi ja progresos. Tiom da penoj de kleruloj kaj altklasanimaj homoj sentantaj la necesecon de lingva unueco igos ĝin nepre sukcesi.


Poste ni parolas, paroladas pri lia preferata temo. Pri la temo kiu estas la celo de lia misio, pri kiu li iĝis "MESAGISTO DE FELICO". Miaj antaŭpretaĵaj demandoj restas forgesitaj pro la alloga babilado. Fine mi interrompas lin.


- Ĉu, Pastro, povas la homo atingi la feliĉon en tiu-ĉi mondo?.

- Ne, la kompletan feliĉon, ne. Sed la plejparto el la homoj povus vivi, pli bone, devus vivi, pli feliĉaj ol ili estas nun.

- En nia nuntempa kaj streĉita mondo estas tre malfacile havi animan pacon; kion vi konsilas al ni por atingi ĝin ?.

- Oni ne devas maltrankviliĝi pro la pasinteco kaj pro la estonteco. Nur la nuno tutplene oni devas vi





vi, plenigi sin de pozitivaj pensoj; amo, konfido, kurago, kontenteco .

Multaj homoj sentas sin malfeliĉaj ĉar ili vivas la estintecon. Memoraĵoj. Ili elĉerpas ilian energion kaj malĝojigas la animon. Aliaj vivas pensante pri ankora estonto. Tiuj ĉi korprenas sin. Ankaŭ aliaj celas aferojn estantajn super siaj fortoj. Ĉiuj el ili forigas la nunon kiu estas ununura kaj granda po sedajo.

La Feliĉeco devenas el la pensoj, ne el la okazaĵoj.

- Ĉu vi konsideras laciga la klopodon por ke ni aki ru superegon je nia animo ? .

- Ne. La afero konsistas el la memkonvinkiĝo pere de la pensoj. Unue, ni devas esti konstantaj, poste la kutimiĝo faras la alion. Elstarigu la bonajn ecojn. Pensu bone pri la aliulo. Forgesu liajn malvirtojn. Ĉio tio ĉi, oni pli facile faras per la religio. "Tion kion vi faras al la lasta de miaj uloj tion vi faras al mi ", diris Jesuo Kristo.

- Vi verkis libron " El control cerebral y emocional ". Kiu el ambaŭ kontroloj pli interesas laŭ via opinio ? .

- Ni kontrolu unue niajn pensojn, poste ili kontrolos niajn emociojn. Ni ne permesu al niaj pensoj, ke ili estu influataj de la okazaĵoj. Ekzistas ankaŭ aliaj fiziologiaj metodoj t.e. malstreĉi la muskolojn, rideti k.t.p. . Japana proverbo diras : "Kiam la okuloj ridetas, kuŝas la suno en la koro " .

- La religiaj aferoj hodiaŭ estas modaj, sed ili komplikigas. Ĉu ili ne rilatas al nia malekvilibro kaj angoro ? .

- Jes, kaj ankaŭ ili devenas el tiuj aferoj. Kiam la religiaj principoj mankas, oni pri ĉio dubas kaj forestas la bazo de nia sekureco.



NE KREDI = memmortigo; normala konsekvenco.

KREDI = Paco; solvo.

Tion diris granda kaj fama scienculo.

- Ĉu vi deziras aldoni iom pli por niaj legantoj precipe la junularo ?.

- Ke ili havu grandan Idealon. Tio estas la sekreto de la gejunularo. Triunfo. Tiuj kiuj estas su-
perregataj de ĝuoj ne vivas feliĉaj. Tiuj kiuj emas senutopian celon plezurigaŝ atingante ĝin. Kaj ke ili havu ĝojon, la animan ĝojon kiu trankviligas . Brua gajeco ofte nur kaŝas internan malplenon kaj malĝojon.

" LA ĜOJO ESTAS DE BONFARTO NAGBASENO

NI BANU NIN ĈIUTAGE EN ĜIA ENO " .

Mi tre dankas vin, Pastro Irala pro viaj vortoj kaj mi deziras al vi grandan sukceson en via gravega laboro.

Oni atendas Pastro'n Irala. Li adiaŭas min :

- Kiam mi revenos ĉi tien mi faros la eblon por vi ziti vin ĉiuj en via Klubo.

- Ke ĝi estu baldaŭ.



BENEDIKTO



11

DEZIRAS KORESPONDI

----S-ro. STEFAN PETROV el bulgaro, kun hispana es perantistino, 28-34 jara . Ne gravas ŝian profesion: Lia adreso estas :



BULGARIO, VARNA - 10 Kvartalo Rupi

Str.Capitano III Zango A-D- Derjatro bloko 8 - cirejo - etaĵo II, Apartamento, 7

& & & & & & & & & & & & & & &

----EVA PETERMANN, 17 jara, lernantino de 4^a klaso de gimnasio, kun hispana knabo. Ŝi ŝatas biologion kaj fisikon. Ŝia adreso :

MAGYARORSZÁG

MÁTÉSZALKA, BAJCSY - 25 UT. 1/B
4 LÉP I.C. 3 HUNGARIO

& & & & & & & & & & & & & &

----SZUSZA MOLNAR, 13 jara, kun geknaboj el ĉiuj landoj. Ŝia adreso :

BUDAPEST II - PASARÉTI UT. 105

HUNGARIO

& & & & & & & & & & & & & &



----AGNES SZANTGYÖRGYVÁRI, 13 jara, kun geknaboj el ĉiuj landoj . Ŝia adreso :

BUDAPEST II - SZILÁGYI FASOR 33

HUNGARIO

& & & & & & & & & & & & & &

12

